

## NOMOJ DE BESTOJ KAJ PLANTOJ EN ESPERANTO

de G. F. MAKKINK (Nederlando).

Verkante aŭ tradukante biologiajn tekstojn oni ofte sin trovas antaŭ la neceso uzi nomojn de bestoj aŭ plantoj, kiuj ankoraŭ ne ekzistas en Esperanto. Oni tiukaze povas trovi solvon laŭ diversaj vojoj:

1. Oni povas helpi sin uzante la sciencan, latin- aŭ grekdevenan nomon. Tio tamen portas kun si gravajn maloportunaĵojn: a. oni ne povas pluraligi kaj akuzativigi la nomojn; b. la elparolo kaj akcentado ne estas facilaj kaj ne konformas al tiuj en Esperanto; c. por beletraj celoj ili estas maltaŭgaj pro longeco kaj fremdeco; d. la nomoj povas ŝanĝiĝi pro nomenklaturaj kaŭzoj.

La uzado de scienca nomo tamen havas unu avantaĝon: ĝi estas la plej bona indiko de la speco, ĉar la nomo baziĝas sur scienca esploro.

2. Oni povas esperante ortografii la sciencan nomon. Tiel ekzemple oni povas krei por *Ornithorhynchus anatinus*: ornitorinko anatina. Ĉar la dua (speco) nomo limigas la indikon de la unua (genra) nomo, ĝi devas fariĝi adjektivo ĉe la unua, kiu estu la substantivo. Tenante la radikojn kiaj ili estas, oni nenecese entiras tro da neologismoj en Esperanton. La malavantaĝo de la eblo de ŝanĝo pro nomenklaturaj kialoj restas. La nura ortografiado kondukas al frenezajo en tiuj kazoj, ne maloftaj en la zoologio, en kiuj la du nompartoj estas identaj, ekz. ĉe *Coccothraustes coccothraustes*. Tiu nomo fariĝas laŭ la nomita procedo „kokotraŭsto kokotraŭsta”, kiu estas same malsaĝa kiel „fripona fripono”.

3. Por eviti neologismojn oni povas traduki la specan nomparton; ĉi-kaze „ornitorinko anasa”. Tiu metodo tamen ofte ne estas aplikebla, ĉar multaj specaj nompartoj ne estas tradukeblaj, pro tio ke ili estas sen senco, onomatopeaj aŭ lokaj. En *Sylvia borin* ekz. la speco nomparto *borin* estis la nomo uzata en la 15a jarcento por la koncerna birdeto en Genova, Italio. Ĝi ne estas esperantigebla kaj necesigas nin anstataŭigi ĝin en Esperanto per adjektivo, plej bone laŭ la modelo de la nomoj en la naciaj lingvoj. Do „silvio ĝardena” (f: *fauvette des jardins*, a: *garden warbler*, g: *Gartengrasmücke*).

Alia eblo estas, substantivigi la specan nomparton, kio liveras „borino”. Tiukaze la genra nomo estas superflua. Tiu procedo donas al Esperanto neologismon, kiu estas uzebla por nur unu speco. Mi volas rimarkigi ke Stojan en sia ornitologia vortaro kelkfoje tenadas du substantivajn nompartojn unu post la alia, ĉi-kaze tiu procedo liverus „silvio borino”. Mia opinie la uzo de tiaj ĝemelaj substantivoj estas kontraŭe al Esperanto. Kunigante ilin al „silvioborino”, ni ekhavas substantivon en kiu „silvio” ricevas la specifan karakteron, kio fakte estas malĝusta, ĉar „borino” estas la specifa nomparto. Se ni uzas „borinosilvio”, la vorto „borino” estas la specifa parto. Ĉar tiu parto estas plene limigita al ĉi tiu birdo, la nomo „silvio” tute superfluas.

4. Farante unu plian paŝon, oni ankaŭ povas esperantigi la genran nomon, se tio estas ebla. Tiel oni evitas ankoraŭ pli da neologismoj. Do tiel: „birdbekulo anasa” (*Ornithorhynchus anatinus*) kaj „arbarbirdo ĝardena” (*Sylvia borin*). Laŭ tiu procedo la nomoj povas fariĝi kontraŭdiraj, kiel en la lasta ekzemplo.

Plue, same kiel ĉe la specaj nompartoj ankaŭ multaj genraj nomoj ne estas tradukeblaj, ekz. ĉe *Lullula arborea* en kiu nomo la genra parto estas onomatopeo. Oni en tiuj kazoj devas ortografii ilin, ĉi-kaze „lululo”.

Esperantigante, oni povas ekhavi similajn strangajojn kiel ĉe la ortografiado, nome en kazoj de taŭtonimoj; ekz. *Coccothraustes coccothraustes* liveras: „kernfrakasanto kernfrakasanta”.

5. Mi jam diris ke sciencaj nomoj povas ŝanĝiĝi. En la botaniko kaj la zoologio tio havas du kaŭzojn: a. oni eltrovas nomon por la koncerna speco kiu estas pli malnova kaj tiukaze, pro la regulo de plifrueco, devas anstataŭi la ĝistiaman. b. Oni opinias dezirinda ke iu genro estu disigata en plurajn genrojn. Tiu dividado okazas pro sistematikaj motivoj. Tiam nova(j) genra(j) nomo(j) estas bezonata(j).

Se ni sekvas la sciencan nomon, ni kreas al ni la dilemon ĉu ni en Esperanto en kazo de ŝanĝado devas sekvi tiun nomŝanĝadon aŭ ĉu ni tenu la esperantigitan nomon. Tion ja ankaŭ faras la naciaj lingvoj, kio evidentiĝas el diversaj hortikulturaj nomoj ekz. *Geranium* anstataŭ la pli nova nomo *Pelargonium*.

Ni plene prikonsciigu, ke nomoj en Esperanto havas nur la funkcion de indikiloj kaj identigiloj, ne de rimedoj por aranĝado aŭ scienca klasigado aŭ de filogeniaj studoj, kiel en la scienco. Tial ni estas plene rajtigataj sekvi nian propran vojon anstataŭ obei la leĝojn de la scienca nomenklaturado. Nia vojo estas tiu de la regulo de internacieco. Komparante la nacilingvaj nomojn, ni povas fari la plej bonan elekton. Por tiuj organismoj kiuj ne havas nacilingvan nomon, kiel ekz. mikroboj aŭ profundmaraj vermoj, kiujn neniu ordinara homo iam ekvidos, ni povas esperantigi la sciencan nomon kiel faras D-ro Støp-Bowitz, tamen permesante al ni devii de ĝi en eventualaj kazoj.

La regulo de internacieco povas liveri al ni multajn bonajn kaj plaĉajn nomojn. Kial krei „rubekolo”, se la naciaj lingvoj liveras al ni la belan nomon „ruĝgorĝulo” (*rouge-gorge* f, *Rotkehlchen* g). Kial krei „fenikuro”, se „ruĝvostulo” estas ne nur pli trafa, sed ankaŭ pli internacia (*redstart* a, *rouge-queue* f, *Rotschwanz* g). Tiumaniere ni tute ne bezonas neologismojn kaj konservas multajn karakterizajn ecojn kaj folklorajojn en la nomoj. Kaj fine: la naciaj nomoj estas ofte pli stabilaj ol la sciencaj.

Tamen ekzistas kazoj en kiuj ankaŭ Esperanto sekvu la sciencon kiam tiu ŝanĝas nomojn. Nome kiam oni malkovras erarojn aŭ nekompletaĵojn. Linné siatempe prinomis *Falco gentilis*, kaj *Falco palumbarius*. Postaj ornitologoj pruvigis, ke la unua estas la junaĝa reprezentanto de la plenkreska

*Falco palumbarius*. Tial la scienco forstrekis unu nomon, nome la pli novan *Falco palumbarius*. Tiel ankaŭ povas okazi, ke besto kiun la ordinaraĵoj homoj konsideras kiel unu specon, la scienca esploro pruvis esti du specoj. Tiel ekz. la nigraĉapa paruo fakte ampleksas la brilkanon paruo (Parus palustris L.) kaj la salikoparuo (Parus atricapillus L.) kun senbrila kapo.

Tradukante nomojn laŭ la principo de internacieco, oni kelkfoje ekhavas nomon, konfliktantan kun la scienca, ekz. *Podiceps griseigena* (Bodd.) nomiĝas *rednecked grebe* (a) kaj *Rothalsiger Steisssfuss* (g). Oni povus esperantigi per „ruĝkola grebo“. Tiu nomo tamen laŭ signifo estas la sama kiel la scienca nomo de parenca speco *Podiceps rificollis* (Pall.). La naciaj ekvivalentaj nomoj de la lasta estas *little grebe* (a) kaj *Zwergsteisssfuss* (g); la esperanta nomo por tiu speco do povus fariĝi *malgranda grebo*. Mi opinias ke ni trankvile povas agi tiel, kaj se ni timas miskomprenon, ni aldonu la sciencon nomon interkrampe.

\*\*  
\*

En la supra konsideraĵo mi venis al la konkludo ke ni precipe kreu niajn esperantaj nomojn el la estanta lingvomaterialo laŭ la principo de la internacieco. Tiel farante ni tamen venas en la marĉan terenon de ne bone konfirmita speconocio, kiam oni ofte renkontas en la mondo de laikoj. Tiun malavantaĝon ni tamen evitu; ni ja tre bone povas samtempe uzi la sciencon specolimon kiel bazon. Kreante nomon ni devas esti certaj ke nur unu speco estas indikata per la nomo. Se ni ekz. deziras nomon por birdeto, kiu supreniras arbotrunkojn kaj kiu en diversaj naciaj lingvoj estas nomita „arbgrimpanto“, ni singarde konsultu la sciencon por ekscii ĉu la arbgrimpanto de ekz. Francio estas la sama speco kiel la arbgrimpanto de Ruslando. Fakte ekzistas almenaŭ du similaj, sed malsamaj specoj, kiuj en la diversaj landoj havas la saman nomon. En Esperanto ni tamen devas distingi ambaŭ specojn, aldonante adjektivajn kromnomojn al unu aŭ ambaŭ. La faŭno kaj flaŭro de Esperantio enhavas ĉiujn specojn de la mondo kaj tio postulas specialan zorgon ĉe la nomdonado, por ke intermikso ne okazu.

\*\*  
\*

Kion, do, faris Zamenhof kreante nomojn por bestoj kaj plantoj? Estas certe ke li sekvis la principon de internacieco (ĉevalo, kato, hundo, najtingalo, ktp.). Li tamen ankaŭ prenis sciencajn nomojn (anaso, ansero, sciuro, erinaco, turdo, ktp.). Tion li ofte faris kiam la naciaj lingvoj ne liveris al li komunan radikon. Ekzistas tamen pluraj kazoj en kiuj Zamenhof prenis la sciencon nomon, kvankam la naciaj lingvoj unuanime prezentis la saman radikon. *Cuckoo* (a), *coucou* (f), *Kuckuck* (g) havas la radikon *kuku'* kaj fakte Z. estus devinta krei „kukuo“. Kontraŭe li prenis „kukolo“ laŭ la scienca *Cuculus*. Li same neglektis la principon de internacieco kreante „keturno“ (*Coturnix*). Pli prave Stojan proponis „kuajo“ el *quail* (a), *caille* (f), *kwartel* (ned.), *Wachtel* (g). Anstataŭ radikon el *frog* (a) kaj *Frosch* (g) li prenis „rano“ el la scienco; anstataŭ radikon el *finch* (a) kaj *Fink* (g) li prenis „fringo“ el la latina *Fringilla*.

Simile li agis koncerne la esperantigon. La komuna signifo de *diver* (a), *plongeon* (f) kaj *Taucher* (g) estas „subakviĝanto“. Z. tamen prenis „kolimbo“ (*Colymbus*), eble pro manko de taŭga esperanta vorto. La komuna signifo de *porcupine* (a), *porc épic* (f) kaj *Stachelschwein* (g) estas „pikilporko“. Z. tamen prenis el la scienco „histriko“ (*Hystrix*), eble ĉar la besto ne estas porko: „pikilbesto“ tamen ankaŭ taŭgas.

Tiu prefero al la sciencaj nomoj estas komprenebla el la scienca profesio de Zamenhof, ne el lia lingvoprincipo; ŝajnas ke li pekis kontraŭ sia propra principo de internacieco kaj kontraŭ tiu de evitado de nenecesaj radikoj. Tion lastan pruvas ekz. la nomoj korvo, frugilego, monedo (Universala Vortaro) kaj korniko (vidu Plenan Vortaron). Ĉi tiuj nomoj koncernas korvosimilajn birdojn kiuj, kun escepto de la korniko, estas nigraj kaj pro tio ofte ne estas distingataj unu de la alia fare de laikoj. Facile Z. estus povinta eviti tri radikojn, se li estus nominta ĉiujn „korvo“, nome resp. „granda korvo“, „semerkorvo“, ŝtelkorvo“ kaj „griza korvo“. Ekzistas pli da tiaj grupetoj, kiuj povus esti nomitaj per unu komuna radiko ekz. akrido-lokusto; ermenomustelo-putoro; aspido-vipuro-kolubro; huzo-sterledo-sturgo; merlo-turdo; karaso-karpo; gufo-strigo; fringo-fringelo-kardelo; ktp. Mi nur mencias la nomojn el U. V. Verŝajne Z. preferis sekvi la nacian kutimon doni al la specoj propran nomon. Same kiel la naciaj lingvoj li troigis tion: ankaŭ Esperanto nun havas „pantero“ paralele kun „leopardo“ por la sama besto *Felis pardus*. Diversaj el la nomitaj bestoj estas tiom parencaj ke la scienco uzas por ili la saman genran nomon ekz. *Felis tigris*, *Felis leo*, *Felis pardus*. Kial ne sufiĉus por Esperanto unu grupnomo kun aldona adjektiva speco indiko? En tio Z. ne sekvis la sciencon.

Kontraŭ tiuj kazoj staras aliaj kiuj montras ke Zamenhof tamen ankaŭ esperantigis nomojn, eble laŭ la ekzemplo de la naciaj lingvoj. Li tion faris, kvankam li plenmotive estus rajtigita preni sciencon nomon. Li nomas kelkajn eĉ en U. V., kiu estas vortaro de nur radikoj, ne de derivitaj vortoj. Tie mi trovis kvar bestonomojn kaj tri aŭ kvar plantonomojn (tiu kun\* povus esti radiko laŭ la scienca nomo),  
molanaso (*Somateria mollissima* (L.)),  
norda cervo (*Rangifer*),  
rampaĵo (*reptilio*),  
sonserpento (*Crotalus*),  
sunfloro (*Helianthus*),  
terpomo (*Solanum tuberosum* L.),  
trifolio\* (*Trifolium*),  
vinbero (*Vitis vinifera* L.).

\*\*  
\*

Fine mi volas demandi, kiujn organismojn Zamenhof celis per la nomoj kiujn li proponis. Ni, posteuloj ja rajtas scii precize kiujn biologiajn specojn la nomoj indikas. Zamenhof mem ne aldonis la siatempajn sciencajn nomojn, sed nur la ekvivalentojn en kvin lingvoj (a, f, g, pola, rusa). Per multaj

nomoj Z. celis tipon de besto aŭ planto, ampleksantan jen multajn, jen multajn specojn. Nomoj kiaj „birdo”, „fiŝo”, „papilio”, „anaso”, ktp. havas vastan sencon de klaso, ordo, familio, genro aŭ de ia malpli severe sistematika grupo. Aliaj havas nur specan signifon, kiel „hortulano” (*Emberiza hortulana* L.) „frugilego” (*Corvus frugilegus* L.), „bramo” (*Abramis brama* (L.)), „ĝirafo” (*Giraffa camelopardalis*), „tigro” (*Felis tigris* L.), „karaso” (*Carassius carassius* (L.)), „merlo” (*Turdus merula* L.), „huzo” (*Acipenser huso* L.), ktp.

Plue ekzistas tuta serio da nomoj pri kiuj oni povas dubi kiom da specoj ili indikas. Ĉu ekz. „cikonio” indikas nur la blankan cikionon *Ciconia ciconia* (L.) aŭ ankaŭ la nigran *Ciconia nigra* (L.)? Tiu demando estas aktuala, ĉar se okcidentano renkontas la nomon „cikonio”, li pensas pri la okcidenta speco, la blanka; se ĉino renkontas la nomon, li pensas pri la orienta speco, la nigra. En la hejmlando de Zamenhof ambaŭ specoj troviĝas, do dubo ekzistas pri la signifo de la nomo. Oni ankaŭ povas konsideri, ĉu la Linnea nomo *Ardea ciconia* L. estis la ekzemplo, aŭ la Brissona *Ciconia ciconia* (L.). En la unua kazo „cikonio” indikas la specon, en la dua ĝi povas indiki la genron *Ciconia* de Brisson.

Ankaŭ ĉe aliaj nomoj oni povas demandi al si, kiajn specojn la nomo koncernas. La nomo „gado” estas laŭ la naciaj tradukoj en U. V. *Merluccius merluccius* (L.), kiun Linné siatempe nomis *Gadus merluccius*. Tiu ĉi kazo pruvas ke Zamenhof prenis genran nomon por indiki specon, ĉar la nacilingvaj nomoj ne enhavas la radikon *gad*. P. V. kaj Enciklopedia Vortaro tamen difinas ĝin, malgraŭ la tradukoj en U. V., sed prave laŭ zoologia vidpunkto, kiel genron.

Simile Z. prenis la genran nomon por speco en la kazo de la tetrao. En U. V. troviĝas la triopo „tetro”, „tetrao” kaj „urogalo”. Estas evidente ke la lasta identas kun *Tetrao urogallus* L. Same evidente estas, ke „tetro” estas *Tetrao tetrix* L. (nun *Lyrurus tetrix* (L.))<sup>1)</sup>. Kio do estas „tetrao”? Laŭ la nacilingvaj tradukoj tiu estas speco, kiun Linné siatempe nomis *Tetrao bonasia* (nun ĝi nomiĝas *Tetrastes bonasia* (L.)). Kial Z. ne kreis „bonazio”? Ke Z. prenis genran nomon por speco, nur povas kaŭzi miskomprenojn. Tio ja okazis ĉe „mustelo”. *Mustela* estas la genra nomo kiun Linné donis al diversaj rabobestoj, nome al *Mustela martes*, *M. lutra*, *M. erminea*, *M. nivalis*, *M. putorius*, ktp. Estas klare ke Z. elektis la genran nomon „mustelo” kaj la specajn nomojn „lutro”, „ermينو” kaj „putoro”. Tamen Z. celis la specon *Mustela martes* L., ĉar en la kvinlingva U. V. li aldonis *martre* (f), *marten* (a) kaj *Marder* (g), kio pruvas ke li celis specon, kiu nuntempe ampleksas *Mustela martes* L. kaj *Mustela foina* Erxl. La fakto ke la radiko „mart” (tria monato) estis okupita, eble devigis Z. preni „mustelo” por la speco *M. martes* L. Kial li ne kreis, ekz., „martro”, restas enigmo. Estas bedaŭrinde ke Z. tiel intermiksas la signifojn de genro kaj speco; P. V. nun uzas la nomon „mustelo” en genra senco.

<sup>1)</sup> Por „tetro” la angla traduko ne estas *grouse*, sed *black grouse*.

Alia misaĵo devenas de malĝusta uzo de la nacilingvaj ekvivalentoj en U. V. de Z. Ni rigardu la ekzemplon de la triopo aspido — kolubro — vipuro. La aspido estas certe *Vipera aspis*, sed la aldonita germana ekvivalento *Natter* kaj la franca *couleuvre* erare ŝajngigas ke la familio *Colubridae* estas celita. Por tiuj serpentoj Z. plue kreis la nomon „kolubro”. Kiel anglajn tradukojn Z. nomas *adder* kaj *snake*, kiuj indikas resp. la genron *Vipera* kaj la ordon de la serpentoj. Krome li donas „vipuro”, kiu nomo laŭ la angla kaj franca tradukoj indikas *Vipera*, sed la donita germana nomo *Viper* speciale koncernas la *Aspisviper*, la aspidon!

Misuzo de tro ĝeneralaj nacilingvaj ekvivalentoj ankaŭ aliloke okazas: *perch* (a) ĉe „perĉo” kaj ĉe „perko”; *owl* (a) ĉe „gufo” (*Bubo bubo* (L.)). Ankaŭ troviĝas tute erara nomo, ekz. *hedge-sparrow* (*Prunella modularis* (L.)) ĉe „silvio” (*Sylvia*).

\*\*  
\*

Ne estis mia celo malkonstrui la terminaran laboron de Z. Strebado al la plej bona prinomado instigis min al analizado de la laborometodo. Ke malaprobindaj, eĉ malĝustaj nomoj estas renkontitaj en U. V., ni ne riproĉu al Z., kiu ne estis biologo kaj erare opiniis ke la sciencaj nomoj estas stabilaj kaj taŭgaj. La Zamenhofaj malatentoj pri siaj propraj reguloj kaj la erarigaj kaj eraraj nomoj estu por ni, kiuj plukonstruu lian terminaran laboron en fakaj kampoj, avertaj vojsignaloj. Respondece ni devas atenti same niajn lingvajn principojn, kiel nian celon: krei vere identigajn nomojn.

#### Oni ĉerpis el „Scienca Revuo” por nacilingvaj periodaĵoj:

En la „J. Brit. Food Manufacturing Industries Research Association” de aprilo 1950 aperis sufiĉe ampleksa resumo de la artikolo de d-ro W. J. Nijveld pri „Efiko kaj psikologia aplikado de koloroj” en Sc.R. 1 88.

Dupaĝa resumo de la sama artikolo, farita de d-ro César Anjo, aperis en la Portugala gazeto „Atomo” N-ro 38<sup>a</sup> de 28-II-1951. Ni insistas ke, ĉerpante el Scienca Revuo, oni menciu tion, prefere kun numeroj de la koncernaj volumo (jaro) kaj paĝo.

En la Gvatemala ĵurnalo hispanlingva „*El Imparcial*” No. 10045 (26-X-1951) sur la 3a kaj 8a paĝoj troviĝas sufiĉe ampleksa artikolo pri Scienca Revuo, kiu resumas la 2an numeron de la 3a volumo. Verkis ĝin la UIEA-delegito, d-ro Jules Bonge, kiu meritas pro tio gratulon. Tamen ne meritas aplaŭdon la fakto ke la aŭtoro permesas al si prezenti antaŭ ne-esperantista publiko Esperanton sub jena formo: „*enketo pri prononcado e skribmaniero de literoy e nombroy*”, „*pri la malsukceso de experimentoy*”.

La Redaktoro.